

Lord George Gordon Byron ,
 Die Sonne des Schlaflosen
tradukita de Adolf Böttger

Schlafloser Augen Sonne! Trüber Stern,
 Dein tränenvoller Strahl erzittert fern, -
 Du offenbarst die Nacht, die dir nicht weicht:
 O wie dir ganz des Glücks Erinn'rung gleicht!
 So glänzt auch längst vergangner Tage Licht,
 Es scheint, doch wärmt sein schwaches Leuchten nicht.
 Der wache Gram sieht eine Luftgestalt,
 Scharf, aber fern! - klar, aber ach - wie kalt!

*Traduko de la Angla poemo “Sun of the Sleepless” de LORD GEORGE GORDON BYRON (*1788-01-22 – †1824-04-18) en la Germanan de ADOLF BÖTTGER (*1815-05-21 – †1870-11-16).*

Arg-1101-2220 (2014-12-26 16:17:26)

Tiun ĉi poem-germanigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la malnova libro “Byron’s sämmtliche Werke”, presita en la germana urbo Lepsiko (Leipzig) en la jaro 1841. Pri la tradukinto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf_Böttger.

Lord George Gordon Byron ,
 La suno de l' sendormulo
tradukita de Manfred Retzlaff

De l' sendormulo suno, fora stel',
 Vi tremas larme en la nokt-malhel'.
 Simbolo estas vi de l' nokta hor',
 Egalas tute de l' feliĉ' memor'.
 Ĉar tute same brilas lumo de
 Pasintaj tagoj, sed varmigas ne.
 Ĝin klare enaere vidas mi,
 Sed fride el la foro lumas ĝi.³⁴

*Traduko de la Angla poemo “Sun of the Sleepless” de LORD GEORGE GORDON BYRON (*1788-01-22 – †1824-04-18) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2014-12-11.*

Arg-1101-2222 (2014-12-11 16:12:21)

³aŭ: Sed tre malvarme lumas tiu ĉi.

⁴aŭ: Sed kiel fride lumas tiu ĉi!